

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 30an de aŭgusto 2012, per Skype.

(Protokolo aprobita la 27an de septembro 2012.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Asbjørn Lindh en Oslo
Ulf Chr. Lunde en Os en Hordaland (prezidis la interkonsiliĝon)
Mario Machlik en Tromsø
Ingebjørg Rambjør en Bergen (per la skriba babilujo de Skype)

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 28an de junio 2012

Aprobita.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio.
Skagen vekst: 32357 kr
Skagen høyrente: 61787 kr

3. Broŝuro

Ni mendis kaj ricevis 1500 ekz. de la broŝuro «Oppdag esperanto» (Malkovru Esperanton). Tio kostis 600 EUR. Kun bankkostoj kaj valizoj por transporto tio egalas al 4838,70 NOK. Mario Machlik portis la stokon el Slovakio al Norvegio. La kluboj de Bergen, Oslo, Trondheim kaj Tromsø mesaĝis ke ili subtenas ekonomie la eldonon de la broŝuro, kaj ankaŭ NJE. NEL mem pagas 1000 kr.

Mario dissendis slovakon ekzemplon de alia broŝuro (faldfolio), kaj ni iom diskutis la eblecon uzi ĝin kiel modelo por eventuala norveglingva faldfolio. Ne estis definitiva konkludo.

4. Informkartoj

La oficejo havas grandan stokon de informkartetoj pri la jubilea jaro. Temas pri «freŝa varo», disdonenda ĉi-jare. La estraro diskutis kie disdoni la kartojn ekz. en manĝejoj, kafejoj, kaj afiŝtabuloj en vendejoj. La membroj ricevis kelkajn ekzemplerojn kune kun la membrogazeto.

5. Instruista sekcio de NEL

La Instruista sekcio de NEL estas en praktiko ankaŭ la norvega sekcio de ILEI. Ni konstatas ke nia Instruista sekcio en realo dormas. Ni diskutis la aferon, kaj decidis tamen ne formale

malfondi ĝin, okaze de tio ke ĝi iam reviviĝos. Ni ankaŭ diskutis la demandon ĉu tiu kiu peras la kotizon al ILEI, estu nomata sekciestro aŭ kontaktpersono, kaj petos ILEI nomi la personon kontaktulo.

6. Datoj por estraraj interkonsiliĝoj

La venontaj estraraj interkonsiliĝoj okazos la 27.9., 1.11. kaj 22.11.2012.

7. Eventualaĵoj

Ĉu ni havas kapaciton aranĝi seminarion? Unu ebleco estas seminarieto per Skype, kvankam ekzistas kelka dubo ĉu ni kapablos aranĝi tian aferon ĉi-flanke de la jarŝanĝo aŭ ĉi-flanke de la venonta Landa Kunveno. Ni pludiskutos venontfoje.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30–20:47.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 27an de septembro 2012.

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.